6-a Jaro
N-ro 2(28).

Julio 1931.
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA. MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

**Wilhelm Solzbacher**, La Nova Ondo. — **W. S.**, D-ro Wilhelm Hinsenkamp †. — **Internacia Junulara Agado** (Katolika Junularo — Protestanta Junularo — Komunista Junularo — Socialista Junularo — Liberala kaj Radikala Junularo —Universitata Junularo.) — **Wilhelm Mensching**, La Negroj, Popolo de la Gojo. — **L'Effort**, Veraj Profetoj. — **La Katolikaj Esperanto-Gazetoj.** — **W. Mensching.** — Ĉu Kristo aŭ Mahometo ? — **Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1931.** — **Familiaj Informoj.** — **Nia Movado.** — **Anoncetoj.**

REDAKCIO : **Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Presejo: Imp. DISONAISE, S. Wizandy. Dison. Tél. 1398.

# Abonprezoj de "La Juna Batalanto„

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj. kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1.20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0.50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher. Köln-Dellbrück; Francujo : Strasbourg 3180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).


## ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KATOLIKA AGADO!

**Katolikajn informojn el la tuta mondo**
rapide havigas al vi la dusemajna, grandformata, riĉe ilustrita gazeto KATOLIKA VIVO. Direktoro : Pastro Georges Ramboux, Paris.

**La internacia katolika junulara kaj paca movado**
eldonas por vi sian riĉenhavan, vivece verkitan, kuraĝe batalantan dumonatan organon LA JUNA BATALANTO. Redaktoro : D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln.

**Kombinita abono al Katolika Vivo kaj La Juna Batalanto**
kostas por tuta jaro 6.— RM., por duona jaro 3.— RM. Oni pagas al **Eldonejo La Juna Batalanto, Regina Reiff, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo** aŭ al la Poŝtkontoj sciigataj sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu gazeto. Banknotoj, ĉekoj, poŝtmandatoj, respondkuponoj, UEA-kuponoj ktp. estas akceptataj.

**NOTU** la novan komunan adreson de la Internacia Oficejo de MOKA kaj de Redakcio kaj Administracio de LA JUNA BATALANTO: Kœln-Dellbrueck, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.




# La Nova Ondo

Antaŭ kvar jaroj D-ro Leo Fleischer skribis en ĉi tiu gazeto pri «la novnaciistigo de Eŭropo » (J. B., N-ro 9). « La malnova Eŭropo celas al venko de nova naciismo. Ĝi volas semi denove la maljunan malfeliĉsemon, meti ĝin en junan teron, en la korojn de ne antaŭsentanta, ne scianta junularo... » Kion nia kunlaboranto tiam observis en ĝiaj komencoj, tio nun fariĝis minacanta danĝero.

Nova ondo de la naciismo subakviĝas Eŭropon kaj la tutan mondon. Kaj — tion ni devas konfesi tute klare kaj seniluzie — la katolikoj tiel, kiel ili kondutas nun, ne estas preparitaj, por kontraŭstari ĝin. Multaj el ili eĉ mem apartenas al tiuj, kiuj senkonscie helpas prepari la morton kaj pereon de Eŭropo: la novan mondmiliton.

Estas ja vere, ke vastaj rondoj de la katolika junularo serioze volas la pacon kaj batalas kontraŭ la nova naciista modo montriĝanta en preskaŭ ĉiuj landoj. — Sed ni ne trompu nin pri tio, ke ankaŭ en la katolika junularo kaj ĝiaj asocioj la venenaj ĝermoj de la naciismo ne ĉiam putriĝas, sed kelkfoje kreskas kaj floras. Kion ni vidis, legis kaj aŭdis en la lastaj monatoj, estas sufiĉa pruvo. Nun estas modo en katolikaj junularaj asocioj, okupiĝi pri la « nacia » ideo, ĉar oni pensas, ke ĝuste pro malzorgado de tio en niaj rondoj, nekatolikaj naciistaj movadoj trovis simpation ĉe multaj el niaj gejunuloj. Certe tiu okupiĝo pri pli klara ekkono de la nacia ideo estas bona, kaj eraroj, kiuj tie aŭ ĉi tie povas enŝteliĝi, estas neeviteblaj. Sed oni povas ekkompreni tute klare, ke en tiu okupiĝo pri la « nacia ideo » plifortiĝas la naciismo kaj ŝovinismo. Kompreneble tio okazas ne en la ekstrema formo de la kontraŭkatolikaj naciistaj movadoj, sed tiu pli milda formo estas eble eĉ pli danĝera, ĉar ĝi allogas multajn el niaj rondoj. Mi ne volas doni praktikajn ekzemplojn, kvankam mi observis multegajn, sed la fakto citita estas sendube konstatebla.

Kaj kion faras la porpaca movado de la katolika junularo? La nombro de la grupoj, kiuj okupiĝas pri ĝi, fariĝis pli granda. Tamen la plimultiĝo ne estis konforma al la progresanta tempo kaj al la novaj bezonoj. Krome dispeciĝo estas konstatebla. La IKA-kongresoj aŭ la Demokrataj Porpacaj Kongresoj de Marc Sangnier perdis multon de sia antaŭa signifo. Ne ekzistas sufiĉe da unueco en la agado.

La nova tempo postulas novajn agadformojn kaj novajn impulsojn. Nun — mi diras tion sen vanteco aŭ aroganteco — la tempo postulas novajn iniciatojn de nia MOKA-movado. Mondjunularo Katolika posedas la necesajn antaŭkondiĉojn, por konstrui pli firman unuecan komunecon de la junaj katolikaj porpacoj fortoj, kiuj uzus metodojn kaj organizajn formojn adaptatajn al la karaktero de la nuntempa junularo. La sekvonta tempo devas trovi nin pretaj!

Sed antaŭ ol ni povas entrepreni novan atakon al ekstere, antaŭ ol ni povas komenci novan agadon kaj akcepti novajn taskojn, ni devas pli so-

lide certigi nian internan bazon. Ni devas havi fidindajn naciajn sekretariojn kaj delegitojn kaj internacian organon funkciantan sen troaj financaj zorgoj. Vere, karaj geamikoj, ĝuste tio faras nin kelkfoje hezitantaj: Kiel ni povas organizi fortan porpacan agadon en la tuta katolika junularo, se ni eĉ niaj propraj vicoj, kiuj do volas esti elito por la internacia agado, ne havas sufiĉe da energio kaj disciplino, por gajni milon da novaj abonantoj por nia modesta gazeto LA JUNA BATALANTO! Ĝia nura ekzisto ja nun estas almenaŭ certigita. Sed kion utilas al ni, se ni nur ekzistas kaj bele interparolas inter ni en nia malgranda, kvankam internacia rondo? Ĉu ni do ne plu vidas nian grandan taskon: esti en la tuta mondo inter la milionoj da junaj katolikoj la fortika muro kontraŭ la nova ondo de la detruanta, militon preparanta naciismo, kaj esti la impulso por nova ondo, por la ondo de la paco kaj reciproka konfido!

Pri tio, kion ni devas kaj volas fari, ni parolos en sekvontaj numeroj. De niaj geamikoj tutmondaj ni atendas, ke ili faros sian devon. Nur tiam nia movado povas fariĝi nova ondo portanta tra la tuta mondo la venkon de la Princo de la Paco!

Wilhelm Solzbacher.

---

# D-ro Wilhelm Hinsenkamp †

Denove la Sinjoro de Vivo kaj Morto vokis unu el niaj amikoj en pli bonan mondon, ĝuste en la momento, kiam ni atendis de li gravan helpon por nia agado: La 22 majo je noktmezo mortis en Essen *D-ro Wilhelm Hinsenkamp*, advokato kaj notario, en la 54-a jaro de sia vivo, je la sekvoj de stomakoperacio. En li ni perdas ne nur membron de MOKA kaj membron de la Eldona Kooperativo LA JUNA BATALANTO, sed ankaŭ eksterordinare valoran pioniron por la internacia katolika agado kaj por la enkonduko de Esperanto en katolikajn rondojn.

Ankoraŭ kelkajn semajnojn antaŭ lia morto li estis inter ni en la konferenco de Essen, kies unu invitanto li estis, kaj li estis plena de kuraĝo kaj novaj ideoj por la estonta laboro. Li tie estas elektita kiel estrarano de la nova Esperanto-Propaganda Komitato Katolika, kaj nun jam antaŭ la definitiva ekfunkcio de tiu komitato ĝia plej granda espero estas detruita: D-ro Hinsenkamp ne plu estas inter ni.

D-ro Hinsenkamp estis katolika eminentulo. Li estis en Essen membro de la Preĝeja Estraro de Sankta Ludgerus kaj membro de la urbkonsilantaro. En multaj katolikaj asocioj li estis bone konata kaj tre ŝatata. Inter liaj parencoj kaj plej intimaj amikoj troviĝis multegaj gravaj pastroj kaj ankaŭ unu episkopo bedaŭrinde jam mortinta antaŭ kelkaj jaroj. Lia enterigo estis grandioza atesto pri lia granda aŭtoritato, kaj eĉ la prusa ŝtata ministro por popola bonfarto, S-ro Hirtsiefer, partoprenis. El la Ekzekutiva Komitato de MOKA ĉeestis niaj amikoj Pastro Blum (Kœln) kaj Peter Klein (Essen).

D-ro Hinsenkamp estis unu el tiuj kuraĝaj homoj, kiuj 1920 kunvenis en Hago (Nederlando), por fondi *Internacion Katolikan (IKA)*. Neniu sciis kaj konfesis pli bone ol li, ke por Internacio Katolika *unueca lingvo (Esperanto)* kaj *grava gazeto (Katolika Mondo)* estas nepraj antaŭkondiĉoj.

Katolikoj, lernu Esperanton! Katolikoj ĉiulandaj, unuiĝu vin! Legu kaj subtenu internacian katolikan organon! Tio estis lia ĉiama vokado. Tion li diris al multaj episkopoj kaj eminentuloj, tion li diris al katolikaj studentoj kaj akademianoj, tion li diris al la vasta amaso de la katolika popolo, al la laboristoj kaj al la junularo. Li mem komencis organizi ĉion, kion li propagandis, en Essen kaj la ĉirkaŭaĵo de tiu urbo. En ĉiu paroĥo grupo de IKA kun regulaj Esperanto-kursoj, kun pastro kiel prezidanto kaj profesia instruisto kiel kursgvidanto kaj kun multaj abonantoj de internacia katolika gazeto (tiam KATOLIKA MONDO). Kaj lia persista laboro sukcesis! En mallonga tempo li varbis, tuj post la fondo de Katolika Mondo, *en Essen*, do en unu sola urbo, *500 abonantojn* de tiu gazeto! Tio sendube estas sukceso, kiun neniam antaŭe aŭ poste havis iu gazeto verkita en Esperanto en iu alia urbo. Estas vere, ke liaj varb- kaj propagandmetodoj al multaj (ankaŭ al la aŭtoro de ĉi tiu artikolo) ne multe plaĉis, kaj poste ĉiam estis neeble, ricevi de la plimulto de « liaj » abonantoj la reabonon por la nova jaro — sed ĉiukaze li estis homo kun bonega volo, altaj kvalitoj kaj energia fervoro. 1921 en Graz, 1922 en Luxemburg, 1923 en Konstanz, 1924 en Lugano, 1925 en Oxford li ĉeestis la IKA-kongresojn kaj ĉiam estas elektita kiel prezidanto de la Esperanto-sekcio. Li estis prezidanto de la Presa kaj Eldona Societo «Espero» en Kœln-Nippes fondita 1927 kaj bedaŭrinde pereinta 1928. D-ro Hinsenkamp en la fiasko de tiu entrepreno perdis multe da mono kaj poste iom retiris sin el la movado. Sed poste, kiam li vidis la agadon de MOKA, kiu ne lasis sin timigi per eksteraj cirkonstancoj kaj kuraĝe daŭrigis sian laboradon kaj la eldonadon de LA JUNA BATALANTO, li denove fervore interesiĝis. En letero li skribis: «Vere, ni maljunuloj fariĝis lacaj kaj ripozemaj, ni ne plu taŭgas por la unua fronto en la granda batalo. Sed ni povas ĝoji kaj admiri, ke el la junularo venas tiom da bonaj fortoj, kaj laŭ niaj fortoj ni devas helpi. » Li tiam estis tre malsana. En ĉi tiu jaro li esperis gravan pliboniĝon de sia saneco. Kaj li jam rekomencis sian agadon, verkante artikolon «Esperanto kiel lingvo de la Vatikana Radio-Stacio». Tiu artikolo estas publikigita en la loka jurnalo « Essener Volkszeitung », ĝi poste aperis ankaŭ en «Katolika Vivo» (Paris) kaj kelkaj aliaj ĵurnaloj. En la lastaj semajnoj antaŭ sia morto li multe okupiĝis pri la problemo, kiel enkonduki Esperanton vastmezure en la pastrajn seminariojn. Li preparis detalan planon pri tio, je kiu li ankoraŭ en la lastaj tagoj antaŭ sia morto laboris. La plano ne povis esti finata......

D-ro Hinsenkamp estis imponа parolanto kaj fervora propagandisto. Milojn da paroladoj li faris antaŭ grandaj homamasoj. Kaj ĉiam li faris ilin en interesa kaj altira maniero. Mi jam diris, ke ne ĉio estis perfekta kaj nediskutinda, kaj lia maniero ne taŭgis en ĉiuj kazoj. Mi memoras kunvenon, kie li paroladis kaj kie mi havis multe da peno, por reteni kelkajn junulojn, kiuj sidis apud mi, de laŭtaj protestoj. Ankaŭ lia Esperanto-propagando estis kelkfoje tro altrudema, en la formo tro obstina kaj neĝentila. Mi ekz. jam aŭdis lin diri al famkonata episkopo: «Kiu ne volas lerni Esperanton, tiun mi ne konsideras progresema homo»! Vere li ricevis de multaj homoj la promeson, ke ili lernos Esperanton. Sed de multaj tiaj homoj (inter ili estas mondkonataj nomoj) mi scias, ke ili neniam eĉ komencis plenumi tiun altruditan promeson.

Lia kuraĝo kaj persisto estis admirindaj. Ĉiam li trovis novajn vojojn, por propagandi siajn ideojn. Ni notu, ke li estis inter la plej bonaj propagandistoj de KATOLIKA MONDO, ke li fondis 1926 la germanlingvan varbgazeton «IKA-Stimmen», ke li fondis la «Espero»-Eldonan kaj Presan Societon, ke li estis membro de la Eldona Kooperativo LA JUNA BATALANTO, ke li dum kelka tempo estis prezidanto de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj en Essen. — Li estis simpatia homo, kaj li havis bonan humoron, kiu ankaŭ ĉiam denove montriĝis en paroladoj. Mi memoras kunvenon en granda salono de Kœln, kie dum lia parolado subite malfunkciis la elektra lumo. Tuj li diris: «La potencoj de la mallumo ŝajnas ektimi nian movadon kaj volas malhelpi ĝin! Gesinjoroj, restu sur viaj seĝoj. La lumo, pri kiu mi hodiaŭ vespere parolos al vi, devos venki......»

La nomo de D-ro Wilhelm Hinsenkamp tenos por ĉiamaj tempoj honoran lokon en la historio de la internacia katolika agado kaj de la katolika Esperanto-movado. Kaj ankaŭ nia MOKA tenos ĝin en honoro! Ni preĝas por la mortinta batalanto, por ke li eniru en la eternan pacon!

W. S.

# Internacia Junulara Adago

### Katolika Junularo.

**Pax Romana,** Internacia Katolika Studenta Ligo, nun preparas sian dekan (jubilean) kongreson, kiun ni jam anoncis. La protektoro de la Ligo, Msgr. Besson, episkopo de Fribourg, Genève kaj Lausanne, jus nun estas fariĝinta kardinalo, per kio sendube ankaŭ la signifo de la Pax Romana kreskos. La Direktanta Komitato kunsidis je pasko en Fribourg. Nun estas definitive akceptita regularo por studenta interŝanĝo. La interŝanĝo okazos ĝenerale inter la koncernitaj landoj, do sen perado de la internacia sekretariejo. La formado de internaciaj rondoj en universitataj urboj kaj la gastigo de eksterlanduloj en katolikaj studentaj rondoj estos akcelataj. Grandan laŭdon trovis la manlibro (« Vademecum ») de Pax Romana kun valoraj adresoj kaj informoj pri la universitata vivo en la diversaj landoj. Pri la problemo de la katolikaj studentinoj oni estonte pli multe okupiĝos. En Grenoble (Francujo) okazis 7-10 aprilo 1931 internacia kunveno de katolikaj studentinoj. Partoprenis : 1 polino, 3 svisinoj, 12 germaninoj kaj 30 francinoj, por diskuti pri la aferoj de la katolikaj studentinoj, pri la virinaj profesioj ktp. Kiel aldono de la kvaronjara bulteno de PAX ROMANA estonte regule aperos Misia Bulteno eldonata de la Internacia Misia Sekretariejo de la Katolika Universitata Junularo (sekretario : Pastro Rossel). En la misia konferenco okaze de la PAX ROMANA-Kongreso en Fribourg partoprenos ankaŭ ĥinaj, hindaj kaj eĉ negraj studentoj, tiel ke la karaktero universala estos bele montrata.

**Katolika Gimnastika kaj Sporta Internacio.** En Wuppertal (Germanujo) okazis la internacia piedpilkludo inter la katolikaj sportligoj de Nederlando kaj Germanujo. Ĉeestis 20.000 rigardantoj.

**Katolika Junmetiista Unuiĝo (Gesellenverein).** Jus aperas la nova statistiko, kiu montras, ke nun ekzistas 2291 lokaj unuiĝoj kun 125 365 aktivaj membroj. Jen la nombroj por la diversaj landoj :

| lando | unuiĝoj | membroj | lando | unuiĝoj | membroj |
|---|---|---|---|---|---|
| Germanujo | 1.770 | 93.066 | Italujo | 8 | 470 |
| Nederlando | 108 | 9.105 | Danzig | 7 | 463 |
| Hungarujo | 70 | 6.230 | Belgujo | 5 | 424 |
| Aŭstrujo | 94 | 4.159 | Jugoslavujo | 7 | 350 |
| Svisujo | 69 | 3.000 | Sudameriko | 5 | 209 |
| Rumanujo | 40 | 2.500 | Luksemburgo | 1 | 132 |
| Nordameriko | 17 | 1.539 | Hispanujo | 1 | 23 |
| Ĉeĥoslovakujo | 57 | 1.400 | Individuaj membroj en | | |
| Polujo | 31 | 945 | preskaŭ ĉiuj landoj | | 1.350 |

Interesa estas ankaŭ la listo de la fakaj grupoj ekzistantaj en junmetiistaj unuiĝoj. Ni donu la liston de la Esperanto-grupoj funkciantaj en Kolping-unuiĝoj, kvankam ĝi ne estas kompleta kaj nur donas la unuiĝojn el Germanujo kaj Aŭstrujo. Jen la 11 grupoj: Breslau, Kœln, Dresden, Goch, Recklinghausen-Sued-St. Gertrudis, Hemau, Mayen, Trier, Linz, Wien, Wien-Leopoldstadt.

### Protestanta Junularo.

**Mondligo de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj.** La YMCA-ĉefsekretario W. W. Gethman diris en parolado okaze de la jubileo de la ĉeĥoslovakaj unuiĝoj: «Politikistoj kaŭzis militon, pri kies teruroj kaj sekvoj ili nenion scias kaj por kies prijuĝo ne posedis la necesajn moralajn kaj spiritajn kvalitojn. Sociekonomiistoj kaj financistoj klopodis likvidi la militsekvojn, sed la projektoj, kiujn ili proponis, servis nur por evidentiĝi la malperfektaĵojn de nia ekonomia sistemo. Ni nur pensu pri la milionoj da senlaboruloj, kiuj estas malbone nutrataj kaj vestataj, dum kiam en aliaj kontinentoj centmiloj da pakaĵoj da greno kaj kotono estas detruataj pro manko de aĉetantoj. Venis tempo, kiam ni devas vidi la aferojn, kiaj ili estas. Nenin individuo kaj nenin grupo povas trovi la vojon el la kaoso, se ili nur konfidas al sia propra forto. Helpo povas veni nur tiam, kiam la homoj ekkonos sian propran malperfektecon kaj turniĝas al la plej alta fonto, el kiu ili povas ĉerpi la leĝojn ne nur por sia individua vivo, sed ankaŭ por la internaciaj rilatoj, por la ekonomio kaj la socialaj taskoj. Ni devas helpi al la homoj kaj speciale al la junularo, por ekkoni la signifon de la spiritaj valoroj en nia epoko de la scienco. Ni simple devas denove doni al Dio la honoron en ĉi tiu mondumiĝita kaj homiĝita civilizo».

**BONVOLU NE FORGESI** tuj sendi la abonprezon por LA JUNA BATALANTO!



### Komunista Junularo.

**La Spartakiado,** internacia bolŝevista sportfesto preparita en Berlin por julio nunjara, estas malpermesita de la prusa polico pro danĝero al la publika ordo.

**Komunista Junulara Internacio.** «Ni devas pli rapide kreski», diras artikolo en la lasta numero de la Junulara Internacio. En la lasta jaro la Komunista Junulara Internacio gajnis 25.000 novajn membrojn en Germanujo, kie ĝi nun havas jenajn organizajn celojn: 100.000 membroj, 75.000 legantoj de la «Juna Gvardio», 30.000 abonantoj, 3.000 junularaj korespondantoj kaj 3.000 kolportistoj. La Komunistaj Junularaj Asocioj malkreskis en jenaj landoj: Francujo (de 7374 en novembro 1929 al 3350 en januaro 1931), Svedujo (de 15.000 en nov. 1929 al 4.500 en aprilo 1931). Usono (de 3332 en nov. 1929 al 2.000 en aprilo 1931). Pri la novaj propagandmetodoj de la komunista junularo J. B. raportos en la sekvonta numero.

### Socialista Junularo.

**La Socialista Junulara Internacio** antaŭ nelonge sendis jenan leteron al la Internacia Labor-Oficejo en Genève : « La Socialista Junulara Internacio observas kun plej granda intereso la klopodojn de la Internacia Labor-Oficejo por evoluigi la protekton de la laboranta junularo kaj salutas kun kontenteco la iniciaton de la franca laborista delegito Jouhaux je la XIV-a Internacia Labor-Konferenco en junio 1930, al kiu oni dankas, ke la Administra Konsilantaro de la ILO denove rivevis rezolucion, per kiu ĝi estas alvokata, «ekzameni, per kiuj iloj la plena protekto de la saneco de la infanoj kaj gejunuloj povas esti certigata, kaj ebligi al ili plene evoluigi siajn kapablojn kaj per korpa kaj morala eduko kiel ankaŭ per ĝenerala kaj profesia eduko prepari ilin al vivo vere inda de homo». Plue estas skribite i. a.: «La Socialista Junulara Internacio opinias, ke krom la **internacia krizo rilate la metilernantojn** kaj la problemoj de la profesia formado la **senprofesieco kaj senlaboreco de gejunuloj** kaj la per tio kaŭzitaj danĝeroj de la fremdiĝo de la profesio kaj de la senmoraliĝo de vastaj medioj de gejunuloj necesigas iniciaton de la Internacia Labor-Oficejo. La ILO tial estas petata de la junularaj asocioj aliĝintaj al SJI, ke ĝi plifortigu la fortojn por la certigo de la junulara protekto en la diversaj landoj per preparo de internaciaj konvencioj kaj rekomendoj». La direktoro de la Internacia Labor-Oficejo, Albert Thomas, skribis en sia respondo i. a.: «Kun ĝojo mi konstatis, ke la minimumaj postuloj akceptitaj de la Amsterdama kongreso de la SJI grandparte enhavas la samajn principojn kaj ideojn, kiujn la Internacia Labor-Oficejo provas realigi rilate la protekton de la laboranta junularo».

### Liberala kaj Radikala Junularo.

**La Internacia Konferenco de Liberalaj Junularaj Societoj** havis 10-11 novembro sian duan kunvenon en London kun delegitoj el Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo kaj observantoj el Usono. Oni diskutis pri la problemo de la malarmado, pri la minacoj al la demokrateco, pri la kreskado de la liberalismo en la diversaj landoj. La proksima konferenco okazos en Den Haag (Nederlando). Fina rezolucio diras: «La konferenco... estas konvinkita, ke en la spirito kaj la principoj, kiujn ĝi reprezentas, konsistas la remedo por la politikaj, sociaj kaj ekonomiaj malbonoj, je kiuj la mondo suferas. Ĝi bedaŭras la kreskadon en multaj landoj de malvasta kaj netolerema naciismo, kiu montriĝas en la plifortiĝo de doganbaroj kaj en la daŭrigo de provokantaj armadoj: ĝi observas kun zorgo la kreskantan tendencon forlasi demokratecon kaj akcepti diktatorecon: ĝi protestas kontraŭ maljustaĵoj al politikaj, rasaj kaj religiaj malplimultoj; kaj fine ĝi alvokas la movadojn, kiujn ĝi reprezentas, agadi senlace por la realigo de siaj principoj kiel gvidanta forto en la nacia kaj internacia politiko».

### Universitata Junularo

**La Internacia Instituto por Intelekula Kunlaboro** en Paris (oficiala institucio de la Ligo de Nacioj) eldonis jenajn novajn publikigaĵojn: «La studenta interŝanĝo en Eŭropo. (listo de ĉiuj naciaj kaj internaciaj oficejoj okupiĝantaj pri studentinterŝanĝo); « Libertempaj Universitataj Kursoj en Eŭropo » «Naciaj Institutoj eksterlande»: « Listo de internaciaj studentaj unuiĝoj».

**Je la unua fojo** okazis en ĉi tiu jaro je la 31 marto en Paris komuna konferenco de la direktoroj de la diverslandaj universitataj oficejoj tutlandaj kaj de la delegitoj de la internaciaj studentaj organizaĵoj. Poste la studentaj delegitoj kunvenis solaj (1 aprilo) kaj priparolis speciale la kunlaboron de samfakaj studentoj laŭ la ekzemplo de la juristoj, kiuj okaziĝis en la kadro de la Internacia Studenta Konfederacio (CIE) tian kongreson en Bruxelles (16-21 aŭgusto 1930).

**Internacia Studenta Konfederacio** havos sian nunjaran kongreson en Bucureşti (Rumanujo), 15-20 aŭgusto. En la jurista kongreso de Bruxelles suprecitita ĉeestis delegitoj el Belgujo, Bolivio, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Hispanujo, Hungarujo, Luksemburgo, Meksiko, Polujo, Rusujo (elmigrintoj), Skotlando, Svisujo.

**PAX ROMANA.** Vidu sub «Katolika Junularo». (daŭrigota).

# LA NEGRO, POPOLO DE LA ĜOJO

*De Pastoro Wilhelm Mensching.*

El la valora libro de la protestanta pastoro Wilhelm Mensching « Im vierten Erdteil » (« En la kvara kontinento ».) Hans Harder Verlag, Wernigerode/Harz, Germ., bind. 3.25 RM.) ni represas interesan ĉapitron.

Blanko estas ĉe la negroj de Centra Afriko kiel ĉe la antikvaj slavoj, la ĥinoj kaj aliaj la koloro de la malĝojo. Kaj ke nigro estas vera koloro de la ĝojo, tion mi ofte en du kontinentoj, Ameriko kaj Afriko, travivis. En *amerikana* junulara tendaro mi estis boatveturinta kun la junuloj sur la Neshaminy-rivero estis manĝinta kaj interparoladinta kun ili. Kiam ni vespere sidis ĉe la fajro kaj mi estis rakontinta al ili pri la germana junulara movado, mi proponis, ke oni kantu popolkantojn. Kaj kion ili tiam kantis? *Negrokantojn!* Aliajn popolkantojn Ameriko ne havas! La negroj donacis al ĝi kantojn, en kiuj mirinda simpleco kaj intimeco kuniĝas. La plej fama kantisto de Ameriko estas la negro Roland Haynes. De kortuŝa riĉeco kaj beleco estas ofte la versoj de la negropoeto Countee Cullen. Kaj tiu homo preĝas al la Kreinto, ke li bonvolu ne doni al iu negra infano la donon de la arto, ĉar ja lia kaŭtkoloro malebligus al li inter la blankuloj, realigi la kreantan forton de la formado. Kiom da ĝojo jam detruis al si la blanka raso per la subpremado de la nigra!

Neelĉerpebla fonto de la ĝojo fluas en la negra animo. Sankta Paŭlo nomas inter la fruktoj de la Sankta Spirito la ĝojon. Sendube ĝuste la negroj tute ne estas malriĉaj je la aliaj de li cititaj fruktoj de la Sankta Spirito : ĉasteco, fideleco, pacienco, mildeco ktp. Sed ili havas tute speciale la kapablon, enigi la sunon de la ĝojo en ĉion, ankaŭ en paciencon kaj suferkonstantecon. En la libro « Bursting-Bonds » William Pickens rakontas pri la terura mizero de malriĉeco kaj malsaneco de siaj gepatroj kaj poste diras : « Sed de negro oni povas ĉion rabi, nur ne lian ĝojan koron, lian bonhumoron. ». Jam dum la mizero de la Granda Milito, kiun mi travivis en Afriko, mi spertis la trafan verecon de tiu vorto. Kiel senfine malriĉaj do estas ni blankuloj je ĝojo, je la kapableco, povi krei ĝojon, precipe en la rapideganta vivado de la moderna grandurbo kaj en la « batalo por la ekzisto ». Por mi en New-York estis ĉiam ĝojo, kiam mi en konferencoj aŭ alie vidis William Pickens en mia proksimeco kaj aŭskultis de tempo al tempo lian ridadon, en kio enestis io kiel de la praarbaro de Centra Afriko, kie neelĉerpeble elŝprucas la fontoj de la eterna Nilo. Ni ne fariĝas veraj homoj, al ni mankas io, nia kulturo restas neperfekta, se ne la eternaj fontoj de la ĝojo enfluas, se nia vivado restas tiel ĉagrena, tiel tordiĝa, batalanta kaj turmentanta.

La rasfiereco venĝiĝas, ĝi malriĉigas nin. Kaj tamen tiom da riĉeco estas destinita por ni. Ankoraŭ tro multe mankas al ni la « joculatores Dei », la ludantoj de Dio kiel Francisko de Assisi. En la negra animo vivas neelĉerpebla fonto de la ĝojo. La negro devas krei ĝojon! Kaj se li ne rajtas krei alian ĝojon, se oni puŝas lin en la moraston, tiam li eĉ tie malsupre ankoraŭ kreas al la infanoj de la blanka raso ĝojon laŭ ilia karaktero per Jazz-muziko kaj simile.

Kiom venĝiĝas la subpremado de kunhomoj! Subpremitoj fariĝas putrigejo por la aliaj. John Woolman antaŭ 175 jaroj per la plej seriozaj vortoj atentigis, kiom da malutilo suferis la anima vivo de la sklavtenantoj kaj iliaj infanoj. Tio estis por li la ĉefa kaŭzo kontraŭ la sklaveco. Kion ni diru pri tio, se hodiaŭ ankoraŭ blankaj infanoj en Sudafriko estas tute timigitaj, se ili sur transoceana vaporŝipo unuafoje vidas, ke « malaltaj » laboroj estas farataj de blankuloj? Mi devis subite pensi pri Woolman, kiam usona dommastrino — ĝenerale oni tie ja ne havas servistinojn — diris pri alia : « Ŝi estas el la Sudo, kie oni havas negrojn, kaj tial povas bone vidi, ke laboro restas kuŝanta aŭ estas farata de aliaj!



Malestimo de homoj estas bumarango reensaltanta. Mi volis viziti famkonatan nigran pedagogiiston. Li petis blankan pedagogiiston, ke li renkontu min ĉe la stacidomo. Do kun ĉi tiu mi veturis al lia domo. Survoje mi diris al li, kiom min ĝenis en Usono la konduto de la blankuloj al la nigruloj. Tiam li respondis : Ho jes, mia edzino devenas el la Sudo. Ŝi estas bonega virino — mi mem ankaŭ poste spertis tion kiel ŝia gasto —, ŝi ankaŭ estas tre afabla al nigraj geservistoj, ŝi ĉiam komencas interparoladon kun ili dum la laborado, sed se — ĉi tie li nomis la nomon de la nigra pedagogiisto — venus al ni je la tagmanĝo, mi ne scias, kion ŝi farus! Eĉ ĉe bonegaj virinoj tiaj postsignoj de la tempo de sklaveco!

Kiam mi tiam en la nigra familio ĝuis tutkoran gastamon kaj travivis grandan internan pliriĉiĝon, mi pensis : Ho, ke la bonaj homoj ion tian lasas preteriri!

Kiom da malriĉigo de mia vivo rezultus, se mi ne estus povinta eniri en la tutan malnovan spiritan trezoron kaj en la animan bonecon de la nigruloj en Afriko kaj nun denove en Ameriko!

Alirasanoj diras, ke la sklavigo de la afrikanoj, la orhavemo de la almilitintoj, la rabado kaj neniigo de la indianoj kaj de ilia ne malatentinda kulturo kreis la bazon por nia kulturo ĉiam pli malriĉa je animaj valoroj, ĉiam pli pova je mizero, ĉiam pli materialista, kiu en Norda Ameriko kiel en Okcidenta kaj Centra Eŭropo ofte alrigardadas nin en plej senanimaj grimacoj. Kio do nun venu? Ĉu la bumarango? Ĝi jam profunde trafis nian animon.

George Fox vidis maron da mallumo super la tero, sed supre oceanon da lumo. La afrika misiisto Krampf persis, ke ĝuste Afriko kaj ĝiaj popoloj havos grandan misian taskon por la mondo. Ilia nigro estas vere koloro de la ĝoj, kiu ne povas manki en la maro da lumo.

Estas io mirinda, migri tra la mondpartoj kiel trovanto kaj peranto de la ĝojo. Mi preskaŭ hontis, ke ne tiom da aliaj, al kiuj mi tion estus dezirinta, sed ĝuste mi rajtis sperti la tondradon de la Niagara-kataraktoj, post kiam jam Afriko kaj Azio estis pleniginta la okulojn per la superfluo de la belaĵoj.

« Bela estas, patrino naturo, via ornamo, pli bela ĝoja vizaĝo. » Trovantoj kaj perantoj de la ĝojo estas benataj homoj. Ilin ne trafas bumarango.

Vere, la negroj batalas por la animoj de la blankuloj, se ili luktas kontraŭ rasmalestimo, Lynch-justeco kaj aliaj animbarbaraĵoj. Nuntempe la blanka raso estas la plej senĝoja, plej senkonscia, plej maltrankvila, plej ŝanceliĝanta, plej nervoza, plej sortmalkapabla, kaj ankaŭ la plej sanga kaj plej senpreĝa raso de la tero. La savo de niaj animoj per la spirito de la ĝojo estas preta, se ni ne forgesas, ke ni ne estas solaj en la mondo.

## Veraj Profetoj.

« Levante la okulojn en la aeron, mi rimarkis grandegan maŝinon, kiu rapide antaŭenflugis kaj, rondflugante en giganta alteco super la urbo, ŝajnis intenci malsuprenveni. Ĉiuj kunkuris, oni rigardis tra vidtuboj. Unu ekkris : « Tio estas ŝipo venanta el Afriko! ». — « Ne, » diris alia, « ĝi alvenas de Philadelphia en Ameriko. » Dume la stranga ŝipo malrapide malsuprenflugis el kvarmil piedoj da alteco. Ĝi alteriĝis sur publika placo, kaj ok mandarenoj eliris el la veturilo. Ĝi estis veninta de Peking. La vojaĝo estis daŭrinta 7 ½ tagojn. »

— De kiu, vi pensas, estas ĉi tiuj linioj?

De Wells? De Jules Verne?

Tute ne. Ĉi tiuj linioj estas de Mercier, kiu en sia « Bildo de Parizo en la jaro 2440 » pentris tiun bildon pri la aernavigado.

Mercier vivis en la dekoka jarcento. La realeco ŝajnas voli pravigi lin jam longe antaŭ la tempo de li profetita...

Laŭ « L'Effort », Louvain.

# La Katolika Esperanto-Gazetoj.

Decas, ke ni de tempo al tempo parolu pri niaj kolegoj, tiuj katolikaj gazetoj, kiuj kun ni eliras en Esperanto aŭ okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto.

**Katolika Vivo** meritas la unuan lokon. Tiu dusemajna gazeto fondita je la komenco de ĉi tiu jaro, eliras tute regule, preskaŭ ĉiam en amplekso de 6 aŭ 8 paĝoj en granda jurnalformato. Admirinde multajn katolikajn informojn el la tuta mondo enhavis la unuaj 14 numeroj ĝis nun aperintaj, kaj bonegaj ilustraĵoj pliinteresigas la legadon. En Katolika Vivo ni posedas bonegan ilon, por montri al katolikaj eminentuloj kaj gvidantoj la praktikan utilecon de Esperanto! Ni esperas, ke multaj el niaj geamikoj profitos la nunan eblecon, komenci komunan abonon je Katolika Vivo kaj Juna Batalanto, kiu kostas 6.— RM. Ĝis nun nur 8 faris tion! Centoj devos sekvi!

**Espero Katolika**, oficiala organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) ŝajnas fariĝi nura unuiĝa gazeto, por lasi la ĉefan laboron al Katolika Vivo. La lasta numero, kiun ni ricevis, estis de aprilo, kaj ni aŭdas, ke E. K. aperos estonte dumonate. Ankaŭ tiu gazeto estas grava, speciale por tiuj, kiuj interesiĝas pri la internaj aferoj de la Katolika Esperanto-movado kaj de IKUE.

**Informoj** estas malgranda, sed interesa bulteno, kiu aperas en Wien (Aŭstruio) kiel informilo de la tiea Katolika Unuiĝo Esperantista. La lastaj numeroj publikigis interesajn artikolojn, ekz. pri «Esperanto aŭ angla lingvo» laŭ parolado de nia amiko Walter Mudrak. La benediktana prioro P. Nedwid estas la «patro» de la gazeto, kaj S-ro Chiba estas ĝia afabla vartisto.

**Brita Katoliko** venas el London kaj estas redaktata de F-ino Mann. Ĉar la gazeto, kiu aperas kvaronjare hektografite, volas ĉefe varbi en katolikaj rondoj de la vasta brita Imperio por Esperanto, ĝi prefere parolas angle, sed scias bonege ankaŭ doni okazon al lingva ekzercado.

**Nederlanda Katoliko** aperas monate kaj havas similan taskon por sia lando. Ankaŭ en **Germanujo** kaj **Ĉeĥoslovakujo** aperas similaj informiloj de la katolikaj Esperanto-ligoj, sed oni ne sendas ilin al ni. Cu ni devas aldoni, ke ankaŭ la diversaj nacilingvaj organoj de MOKA (ekz. Erwachende Jugend. Jeunesse Mondiale Catholique, Universal. ktp.) fervore laboras en la sama direkto kaj ke nun en ĉ. 20 katolikaj gazetoj aperas regulaj Esperanto-rubrikoj?

Kaj pri **LA JUNA BATALANTO** ni ja ankaŭ ne bezonas paroli. Ni dezirus, ke ĝi baldaŭ fariĝu pli ampleksa, pli bela, pli ofte aperanta. Tio dependas de vi, kiuj legas ĉi tion. Helpu, kaj ni sukcesos!

## ĈU KRISTO AU MAHOMETO?

En Chicago aperas amerikana-islama gazeto «La mahometana aŭroro». Artikolo de la lasta jarkolekto alvokas la kristanojn: Imitado de Kristo kaj milito estas neniel konformiĝeblaj. Sed dum ke la kristanoj en la unuaj jarcentoj rifuzis la uzon de armiloj, ili hodiaŭ agas tute alimaniere: «Tial vi devas forlasi la tutan babiladon pri kristaneco kaj fariĝi mahometanoj, kies Sankta Skribo instruas: Vi batalu kontraŭ tiuj, kiuj batalas kontraŭ, vi sed gardu vin, por ke vi ne venu en ekscesojn! Se vi do nun ne volas publike konfesi mahomet anismon, ni tamen almenaŭ volas diri al vi, ke via agado, via tuta konduto praviĝas la mahometanan principon kaj rifuzas la kristanismon, same kiel vi ankaŭ en aliaj esencaj punktoj en via konduto forlasas la kristanismon favore al mahometanaj opinioj. Vi nur estas tro fieraj, por tion rekoni. Sed en vi jam venkas la imitado de Mahometo, kaj unu tagon vi tion devos konfesi. Ĉar vi ne povas esti kristanoj, veraj imitantoj de Jesuo, kaj havi la militon kiel profesio aŭ partopreni en milito».

Laŭ la libro de W. Mensching « Im vier en Erdteil ».

**TRO MULTAJ** abonantoj ankoraŭ ne pagis, kvankam hodiaŭ jam la dua numero de la nova jarkolekto aperas!



# Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1931.

Jen aldono al la du unuaj listoj, kiuj aperis en la marta kaj maja numeroj. Pri detaloj, programoj ktp. skribu al la cititaj adresoj. La listo estas daŭrigota kaj kompletigota. Ni atentigas, ke la citado **ne** ĉiukaze signifas senrezervan rekomendon de la kongreso aŭ de la invitanta asocio.

| | | |
|---|---|---|
| 11-16 julio | **San Francisco** (Usono) | Mondkongreso de la movado por Kristana Penado (Christian Endeavour), Mt. Vernon and Joy Streets, Boston, Mass., Usono. |
| 16-24 juli | **Paris** | Kongreso de la Int. Oficejo de profesoroj de duagradaj lernejoj; A. Beltette, 35, rue du Fief-du-Bon-Recueil, Villemonble, Seine, Franc. |
| 18-21 julio | **Kœln** | Katolika konf. de germanaj kaj francaj profesoroj je duagradaj lernejoj. Kath. Akademikerverband, Kœln, Altenbergerstrasse, 14. |
| 23-29 julio | **Wien** | Int. Skolta Konferenco. 25 Buckingham Palace Road, London SW. 1. |
| 24 julio | **Denver**, Colorado, Usono, | Kongreso de la Mondligo de Edukistaj Asocioj. Augusta, Maine, Usono. |
| 2-9 aŭgusto | **Charleville Mezières** (Fran.) | Junulara Konferenco por Franca-Germana Interkompreniĝo. Jean Luchaire, 86 Rue Claude Bernard, Paris V. |
| 3-10 aŭgusto | **Konstanz** (Germ.). **Elsazo** Franc.). | 11-a Int.-Demokrata Paca Kongreso (Marc Sangnier), 34, Bd. Raspail, Paris, VI. |
| 10 aŭgusto | **Stockholm** | Int. Instruista Kongreso, 2, rue de Montpensier, Paris. |
| 15 aŭgusto | **Bucureşti** | Kongreso de la Int. Studenta Konfederacio. C. I. E., 22, Place de Brouckère, Bruxelles. |
| 17-21 aŭgusto | **Stockholm** | Int. Virina Kongreso de la «Open Door International», 3, Iddesleigh House, Caxton Street, London SW. 1. |
| 24-26 aŭgusto | **Bruxelles & Den Haag** | Int. Konferenco de la Internacia Bibliografia Instituto, Palais Mondial, Bruxelles. |
| 25-29 aŭgusto | **Genève** | Int. Lingvista Kongreso. 5, rue de l'Université, Genève. |
| 1-5 septembro | **Mount Holyoke College** (Usono) | Konferenco de la Internacia Studenta Servo, 13, Rue Calvin, Genève. |
| 2-4 septembro | **Zuerich** | Int Kongreso de Antimilitaristaj Pastroj. Ammerstool, Ned., Ds. Hugenholtz. |
| 7-10 septembro | **Roma** | Int Kongreso por Studoj pri la Popolscienco. Prof. Gini, 10 Via delle Terme di Diocleziano, Roma. |
| septembro | **Budapest** | Int. Mezklasa Kongreso, 55, av. de la Couronne, Bruxelles. |
| septembro | **Paris** | Katolika konferenco por franca-germana interkompreniĝo (nur por invititoj). |
| 18-22 oktobro | **Paris** | Kongreso de la Internacia Asocio por Socia Progreso, Freie Strasse, 27, Basel, Svis. |
| 21 okt. 4 nov. | **Hangchow** (Ĥin.). | Instituto por Pacifikaj Rilatoj, 1641, South Beretania Street, Honolulu. |

## Familiaj Informoj.

### Geedziĝoj.

**Kœln.** D-ro Wilhelm Solzbacher, ĉefsekretario de Mondjunularo Katolika kaj redaktoro de LA JUNA BATALANTO, kaj Regina Reiff eldonejestrino de LA JUNA BATALANTO kaj membro de la Ekzekutiva Komitato de MOKA, geedziĝos la 27-an de julio.

**Wien-Salzburg.** Nia amiko Leopold Lackner kaj Anni Hanka, abonantino de J. B., partoprenantino de la pasintjara Esperanto-kurso ĉe la Katolika Krucligo, informas pri sia geedziĝo, kiu okazis en majo.

### Pastriĝo.

**Katowice-Myslowice.** Nia pola nacia sekretario Ludwik Kosprzyk pastriĝis en junio en Katowice kaj legis sian unuan sanktan meson en Myslowice. La ĉefsekretario de MOKA sendis al li nome de nia tutmonda frataro sincerajn gratulojn.

# Nia Movado.

**La ĉefsekretario de MOKA** vojaĝos en aŭgusto kaj septembro en diversaj landoj (Francujo, Svisujo, Belgujo, Luksemburgo, Anglujo, Irlando) kaj esperas revidi multajn geamikojn. Korespondaĵoj kredeble iom prokrastiĝos. Li ankaŭ petas la pardonon de la naciaj sekretarioj pro iom longa atendado al cirkuleroj.

**Nova adreso** de la Internacia Oficejo kiel ankaŭ de la redakcio kaj eldonejo de LA JUNA BATALANTO estas depost 27 julio 1931: D-ro Wilhelm Solzbacher, Koeln-Dellbrueck, Bensberger Marktweg 63.

### Eldonejo LA JUNA BATALANTO.

**Anoncoj** pri LA JUNA BATALANTO aperis en la jenaj gazetoj: «Das Neue Reich» (Wien), «Allgemeine Rundschau» (Muenchen), «Missionsblaetter» (Schweiklberg), «Sobrietas» (Berlin), «Werkblaetter fuer katholische Kinderarbeit» (Berlin), «Marienpsalter» (Vechta), «Universal» (Haderslev), «Erwachende Jugend» (Werl), «Deutsche Volkschaft» (Muenster), «Katolika Vivo» (Paris), «Polnisch-Deutsche Korrespondenz» (Wien), « Christkoenigsbote » (Meitingen).

### Aŭstrujo.

**Nacia sekretario** Walter Mudrak i. a. skribis: Tiom, kiom la malfavoraj ekonomiaj kaj socialaj cirkonstancoj permesas, la movado progresas. Bedaŭrinde ja troviĝas inter niaj geamikoj ankaŭ senlaboruloj. Ni tamen ne senkuraĝiĝas, sed plu klopodas, kaj ĉiuj restas fidelaj. Kun grandega ĝojo ni ĉiam legas nian gazeton J. B.; estas tre bedaŭrinde, ke pro la supre menciitaj cirkonstancoj estas malfacile, varbi novajn abonantojn malgraŭ la ne alta abonprezo. Sed mi tamen sukcesis gajni kelkajn. Vere ideala kunlaboranto nun estas s-ano Hilkersberger en Landeck, li ankaŭ tradukas artikolojn el J. B. por diversaj katolikaj fakaj gazetoj ktp. Rapide mi volas raporti pri 2 okazintaĵoj :

**En Gaming** okazis dum pentekosto renkonto de katolika abstinenca junularo kun 125 partoprenantoj. Mi uzis la okazon, por paroli por katolika paclaboro kaj por Esperanto, menciante MOKA-n kaj J. B.

**Al Krems** la Katolika Unuiĝo Esperantista de Wien okazigis belan ekskurson. Partoprenis 80 personoj, 40 el Wien. Okazis Esperanta diserso kun prediko en Esperanto de Pastro Meŝtan kaj Esperanto-kantoj.

### Danujo.

**Nacia sekretario** Pastro Wolff (Haderslev) bone komencis sian laboron per la Esperanta Rubriko en sia gazeto «Universal». En la du lastaj numeroj po unu paĝo estas disponigita por tio, kaj niaj amikoj D-ro Wilhelm Solzbacher (Koeln), Jan Filip (Praha) kaj A. Bjœrnstad (Oslo) estis la unuaj kunlaborantoj.

### Francujo.

**Nacia sekretario** Prof. P. J. A. Muffang ricevis viziton de du membroj de la Ekzekutiva Komitato de MOKA (H. Kolvenbach kaj P. Klein). Li nun volas fondi subkomitaton de la Esperanto-Propaganda Komitato Katolika fondita en Essen.

### Germanujo.

**Nacia sekretario** H. Kolvenbach preparas novajn propagandilojn, evoluigas la vojaĝservon.

**Berlin.** Stud. Edmund Bartsch skribas: Paca Ligo de Germanaj Katolikoj invitis la berlinajn katolikajn Esperantistojn al sia kunveno, la 8 junio 1931. La Paca Ligo esprimis la deziron, kunlabori kun la Esperantistoj: per Esperanto por paco. La plej bela punkto de la programo estis jena: 15 knabinoj, lernantinoj de F-ino Schelchen rakontis pri sia korespondado kun eksterlandanoj, ne nur kun junuloj, sed ankaŭ kun plenkreskuloj. Plej bonan efikon havis la paroladeto de unu knabineto, kiu men-

**NIA JUBILEA KOLEKTO**, kiu intencas finance helpi nian internacian organon, ankoraŭ atendas vian donacon!



ciis, ke ili, korespondante kun multaj infanoj en ĉiuj mondpartoj, jam ĝojas kaj esperas, ke ili baldaŭ povu korespondi kun la negraj infanoj de Afriko. Riĉa aplaŭdo sekvis la paroladetojn. La prezidanto de la Paca Ligo, registara konsilanto Kloidt, elkore dankis la infanojn kaj ilian instruistinon. Li diris, ke nek varbfolioj nek la plej bonaj paroladoj tiom valoras kiel tia praktika **paca laboro de la infanoj**. Fine li invitis ĉiujn katolikajn Esperantistojn el la tuta mondo, viziti la katolikan pacan kongreson okazontan en novembro nunjara en Berlin. La kongreso estos malfermata per solena diservo en la nova «Pacpreĝejo» de Berlin.

**Berlin.** Esperanto-grupo en la Unuiĝo de Katolikaj Instruistinoj estas fondita de nia kunlaborantino F-ino Schelchen. La grupo deziras kunlabori kun MOKA.

**Frankfurt.** Ni ricevis interesan raporton pri MOKA-demonstracio okazinta la 12 aprilo. Preparis la kunvenon bone sukcesintan la Frankfurta grupestro de MOKA Ostermeier, la ĉefparoladon faris August Guenther, kiu estis veninta, akompanita de 17 anglaj gejunuloj, inter kiuj ankaŭ troviĝis nevino de la brita ministro por eksterlandaj aferoj Henderson. Ĉeestis kelkaj katolikaj eminentuloj, unu parlamentano ktp. kaj la katolika jurnalo Rhein-Mainische Volkszeitung poste publikigis longan raporton.

**Bremen.** August Guenther paroladis « kontraŭ nacisocialismo kaj komunismo ».

**Vojaĝoj.** Nacia sekretario Heinz Kolvenbach preparas i. a. vojaĝon al la Belga Katolika Junulara Kongreso (fine de aŭgusto) kaj al Paris. Adreso: H. Kolvenbach, Duesseldorf, Stoffeln, 23. — August Guenther preparas vojaĝojn al Svisujo (26 julio-8 aŭgusto) kaj al Italujo (kun vizito al la Sankta Patro, 9-23 aŭgusto). Adreso: Werl i. W., Hellweg, 34.

### Peruo.

**Nacia sekretario.** Ildefonso Nunez faras Esperanto-propagandon, speciale en katolikaj rondoj.

### Svisujo.

**Nacia sekretario** nun estas Eugen Vogt, sekretario de la Svisa Katolika Junvira Asocio. Lia adreso: Eugen Vogt, Schweizerischer Katholischer Jungmannschaftsverband, ZUG. Nia ĉefsekretario estis en Zug kaj havis kun la nova nacia sekretario kaj kun Pastro Suter, ĉefsekretario de la Svisa Katolika Junvira Asocio kaj malnova amiko de MOKA (li estis estrarano de la dua MOKA-kongreso en Luxembourg 1922) interesan kaj longan interparoladon. Eble nun ankaŭ en Svisujo nia movado denove prosperos.

## ANONCETOJ.

Anoncetoj, speciale pri korespondado, kostas 0.50 RM. ĝis 20 vortoj.

**Peruo.** Nia kunlaboranto Ildefonso Nunez, CAJAMARCA, Peru, Sudameriko, nun faras aktivan propagandon en katolikaj rondoj kaj petas gesamideanojn ĉiulandajn, sendi al li propagandmaterialon.

**Poŝtmarkoj.** Mi deziras interŝanĝi PM. Ne sendos unue, sed certe tuj respondos. Reg. konsil. Steiner, prez. de Intern. Esperanto-Muzeo, Wien I., Neue Burg, Aŭstrujo.

**Internacia Esperanto-Muzeo** en Wien I., Neue Burg, dissendas diversajn fotojn pri la muzeo kaj vizitoj de eminentuloj po 1 respondkupono; krome du diversajn novajn gvidfoliojn pri Wien kaj Aŭstrujo kontraŭ 1 respondkupono. Mendu ilin!

**Ĉu vi volas korespondi?** Skribu tuj al: Katolika Esperanto-Grupo, Planckstrasse, 117-II., Essen, Germanujo.

**PROFITU** la okazon, kiam vi sendas vian abonprezon por J. B., por mendi kombinitan abonon al KATOLIKA VIVO kaj LA JUNA BATALANTO! Detalojn vidu sur la dua kovrilpaĝo de ĉi tiu numero!

**Eksterordinare favora propono:**

La famkonata verko

## Naturscienco, Mondkoncepto, Religio

de Prof. Dr. Dr. D. Reinke,
Esperanto-traduko de E. Brenken,

nun estas havebla por malpli ol la kvarono de la originala prezo. La verko estas grandformata kaj ampleksas 164 pagojn kaj kostas nur 1.— RM! Jen moderna libro pri naturscienco kaj religio en Esperanto-eldono! Utiligu la favorprezon! Mendu ĉe

**Eldonejo La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.**

---

## DER GROSSE HERDER

12 Bände und 1 Atlas

**Verlangt Probeheft!**

### Der neue Typ des Lexikons

**Gründlich und lebendig, zuverlässig und impulsiv**

Band 1 ist soeben erschienen

Verlag Herder, Freiburg im Breisgau

---

## DEUTSCHE VOLKSCHAFT.

**Ein Kreis**

**junger Katholiken** versucht in dieser **Monatsschrift** unabhängig und kritisch Stellung zu nehmen zur **Politik unserer Zeit.** Das geschieht im Sinne einer entschiedenen Ablehnung des kapitalistischen Systems und einer klaren Hinwendung zu einem katholisch verantwortbaren Sozialismus.

Grössere Aufsätze aus den letzten Monaten sind u. a.: « Politisierung der Jugendbewegung » (Walter Dirks), « Wo bleibt die Wirtschaftsführung » (Heinrich Lenz), « Zollunion » (C. O. v. Soden), « Die fünf Gesichter des Faschismus und die antifaschische Front » (Walter Dirks), « Thomas von Aquin und das Eigentumsrecht » (Dr. J. Pieper), « Falsche Osthilfe » (H. Lenz), « Lebensreform » — auf der Produktionsseite » (W. Dirks), « Um die N S D A P » (K. Knappstein), « Weltwirtschaft aus den Fugen » (V. Siebrecht), « Für oder gegen Russland » (W. Brobeil), « Die Gesinnung katholischer Jugend » (H. Hesse).

**Preis**: Vierteljährlich 1,20 RM.

**Bezug**: Durch die Post oder die Geschäftsstelle Münster i. Westf., Postfach 163.

---

# ALLGEMEINE RUNDSCHAU

## Wochenschrift für Politik und Kultur, herausgegeben

### - von Dr. Georg MOENIUS -

Steht im 28. Jahrgang und hat sich nach dem Urteil der Presse « prächtig verjüngt ». Ein **erster Mitarbeiterstab** nimmt in **programmatischen Aufsätzen** Stellung zu allen Fragen der Religion, Kultur und Politik. Die Rubrik « **Blicke auf die Zeit** » gibt eine Uebersicht, die die verwirrenden Tagesereignisse klären und beurteilen hilft.

**Keiner** Partei dienstbar, abendländisch und völkerversöhnend. An Sondernummern sind erschienen: 2 Abendland-, 4 Belgien-, 2 Russland-, 1 Polen-, 1 St. Augustinus-Nummer, 2 Nationalsozialismus-Nummern, 1 Muttertags-Nummer.

## Urteile über die Allgemeine Rundschau:

« Die Zeitschrift hat Geist und Charakter. Ich freue mich auf jede Nummer. » (Pfarrer W. in B.)

« Aus dieser so prächtigen und hochstehenden Zeitschrift gewinne ich Belehrung, Anregung, eine tiefere Einsicht in die Belange von Kultur und Politik, und es soll mir eine selbstverständliche Dankesschuld sein, immer wieder auf die Vorzüge der Allgemeinen Rundschau empfehlend und werbend hinzuweisen. » (S. K. in Greven)

« Endlich einmal auch ein katholisches Blatt, das für die Wahrheit eintritt! Es hat wirklich heute eine Mission, die katholische, zu erfüllen. Gott schütze und stärke es! (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Ich will ganz offen vor aller Welt meine Meinung sagen: Mit heiliger Freude hat es mich erfüllt, dass sich Ihre Zeitschrift mit solch wohltuender Aufrichtigkeit in den Dienst der wahren Friedensvermittlung gestellt hat. » (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Endlich haben wir eine katholische Zeitschrift, wie wir sie seit langem ersehnten. Oh, dass doch unsere sogenannten « katholischen » Zeitungen von der Allgemeinen Rundschau lernen möchten! Gott segne ihr Wirken! » (Pfarrer H.)

« Ich bin zur Ueberzeugung gekommen, dass Ihre Zeitschrift die wahrheitsliebendste, kulturell höchststehendste, geistig und stilistisch vornehmste ist. » (F. K., Ehingen, 22.4.31).

Verlangen Sie Probenummern oder bestellen Sie ein Probeabonnement zum Vorzugspreis von M 3.— für das Vierteljahr!

**Verlag der " Allgemeinen Rundschau ",
München, Galeriestr. 35 a**

# In der heissen Jahreszeit

kann man immer wieder die Frage hören: "Was sollen wir trinken?" Und dabei gibt es so viele Getränke, die billig und leicht selbst herzustellen sind. Die Schrift

## ALKOHOLFREIE GETRÄNKE

**Anleitung zur Selbstbereitung mit etwa 200 Rezepten**

ist da für jeden Haushalt, für jede Familie, für jeden Abstinenten eine wahre Fundgrube. Sie stellt die 2. Auflage des Büchleins "220 Rezepte", von Julius Rieger dar und ist neu bearbeitet von Pfarrer Häusler, Ladenburg, und Frau Rosin-Lachnitt, Berlin. Dazu

**erstaunlich billig: nur 30 Pfennig**

kostet das reichhaltige Schriftchen. Geschmackvoller Umschlag, handliche Fassung, vielseitige Angaben.

# HOHENECK-VERLAG

**Berlin SW 48, Puttkamerstr. 19**

# Heimat und Volk

ist die Zeitung

**für katholisches und deutsches Volkstum**

Wer ein Blatt lesen will, das frei und unabhängig eintritt für eine

**deutsche Reichserneuerung**

und die Verwirklichung des

**sozialen Volksstaates.**

der abonniere noch heute auf

# Heimat und Volk

Die Zeitung erscheint vierzehntägig. Sie kann durch die Post bezogen werden. Bestellungen bei jedem Postamt. Vierteljährlicher Bezugspreis RM —.90; beim Bezug durch den Verlag unter Streifband zuzüglich 15 Pfennig. Postscheckkonto Köln 65.144. Heimat und Volk, G. m. b. H., Köln, Sachsenring 26.

---

Um allen ernsten Interessenten ein möglichst genaues Kennenlernen von „Heimat und Volk" zu ermöglichen, wird auf Verlangen das Blatt probeweise **viermal gratis** zugesandt. Wir bitten Sie, zu diesem Zweck untenstehenden Vordruck auszufüllen, abzuschneiden, auf Postkarte zu kleben oder als Drucksache zu senden an den Verlag „Heimat und Volk", Köln, Sachsenring 26.

**Hier abtrennen!**

Probeweise Zusendung von „Heimat und Volk" wünscht:

Name: ..............................

Beruf: ..............................

Genaue Adresse: ..............................